Vasilij Devjatnin,

# Ŝipeto

Malgranda ŝipeto
Kun blanka veleto
Naĝadas trankvile sur maro . . .
Sed venis ventego,
Fariĝis ondego—
Pereas ŝipet' sub akvaro!
Kaj homo mizera
Kun kredo sincera
Vivadas trankvile en mondo;
Sed kredo forblovis,
Ondego sin movis,
Kaj homo pereas sub ondo.

*Verkinto de tiu ĉi Esperanta poemo estas* Vasilij Devjatnin *(∗1862 – †1938).*

*Arg-1041-2116 (2014-06-05 09:16:04)*

*Tiu poemo troviĝas ankaŭ en* http://www.ipernity.com/doc/rafmagon/10088921 *. Mi, Manfred Retzlaff, kopiis ĝin el tiu retejo. Pri la aŭtoro vidu la vikipediejon* http://eo.wikipedia.org/wiki/Vasilij_Devjatnin *.*